

Kluba Programo:**novembro:**

- 4 Literatura Vespero – ĉe IBIS
- 11 Filmo de prelego pri Van Gogh (Katalina Kovats) –
ĉe DIORAMA
(1800h: konsilantaro)
- 18 Diskut-rondo – ĉe IBIS
- 25 Trejnado de trejnistoj en TEJO (Saša Kovyazina) –
ĉe DIORAMA

decembro:

- 2 Literatura Vespero – ĉe IBIS
- 9 "La malaperanta stelo" (Tim Owen) – **ĉe DIORAMA**
(1800h: konsilantaro)
- 16 Zamenhofa Vespero – **ĉe DIORAMA**
- 23 dec – 6 jan
Neniu kunveno

januaro 2017:

- 13 Novjara Festo – **ĉe DIORAMA**

Esperanta Kalendaro:

27 dec-3 jan 2017: 15a Novjara Renkontiĝo (NR)
Saarbrücken, Germanio www.esperantoland.org/nr.


19-21 majo 2017: Brita kaj Skota Kunkongreso, Edinburgo.
<http://britakongreso.org>.

22-29 julio 2017: Universala Kongreso de Esperanto, Seulo,
Sud-Koreio. www.uea.org/kongresoj

Aliaj anoncoj:

Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 9a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.



(vidu 11 novembro)

Vincent Willem VAN GOGH [fan hoĥ] (naskiĝis la 30-an de marto 1853 en Groot-Zundert, la nuntempa Zundert, Nederlando; mortis la 27-an de julio 1890 en Auvers-sur-Oise, Francujo) estis nederlanda pentristo, kiu havis grandan influon al la pentrarto de la 20-a jarcento. Konforme al nederlanda tradicio li montris ordinarajn objektojn tra la riĉeco de lum-ludo, kiel ekzemple en la pentraĵoj *Dormejo en Arles* kaj *Cigana tendaro*. Frua periodo de lia arto estis transiro de realismo al ekspresionismo. Vincent van Gogh lasis ne nur pli ol du mil pentraĵojn kaj desegnaĵojn, sed ankaŭ pli ol ok cent leterojn skribitajn al siaj familio kaj amikoj, el kiuj 652 al sia frato Theo van Gogh, kun kiu li havis tre proksiman rilaton. Ne tre konata en la jaroj 1890-aj lia verko rimarkiĝis de aŭtoroj kaj pentristoj simbolismaj en Francujo, Nederlando, Belgujo kaj Danujo. En la 1930-aj jaroj liaj pentraĵoj altiris jam cent dudek mil homojn al la ekspozicio de la muzeo pri moderna arto en Novjorko (Usono). Lia verko estas plena je naturalismo, inspirita de impresionismo, divisionismo kaj punktilismo, anoncis faŭvismon kaj ekspresionismon. Vincent van Gogh, kiu preferis subskribi siajn pentraĵojn per nur *Vincent* estas nuntempe la plej konata pentristo de la tuta mondo.

(teksto el Vikipedio)

Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,
NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por
diskuttrondo)

Kutima programo ĉe Dioramo:


18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la
ĉefprogramero

22:00 fino



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (Victoria linio)

Euston Square (Circle linio)

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo

020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: John Redgwell, 17 Dover Close,

Braintree, Essex CM7 5TD; Sudorienta: Kevin Murray,

11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB

01932-345779 yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Terry Page (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Anna Lowenstein, Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com,

anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Lastatempe sukcesis ĉe la KER-
ekzamenoj kelkaj kutimaj

ĉeestantoj de LEK-kunvenoj.

Gajnis **MAGNUS HENoch**,
SAŜA KOVYAZINA, **MARTENO**
MINIĤ, **MATT PEPPERELL**,
CHRIS LEWIS kaj **DIANA**

ROBIN. RENATO CORSETTI, kiu sperte organizis la
ekzamenojn je pluraj niveloj en Londono, aperis kun la
sukcesintoj en grup-foto, publikigita en ĵusa numero de La Brita
Esperantisto.

Parolante pri tiu numero, mi laŭdu ankaŭ aliajn enhavojn. **TIM**
OWEN majstre verkis biografiajn artikolojn, pri kaj **PAUL**
GUBBINS, kiu forpasis ĵuse, kaj **HAROLD BOLINGBROKE**
MUDIE, kiu forpasis antaŭ 100 jaroj. Ambaŭ artikoloj estas
detalplenaj sed vastatemaj. Tim bonege verkis, prezentante
karakterojn, historiaĵojn kaj vivojn egale. Li ja kaptis multajn
nuancojn de la respektivaj personecoj, epokoj kaj subtemoj, eĉ,
ekzemple, je homoj krom la centraj herooj. Tim meritas
grandan aplaudon, pro ĉio tio. Troviĝis en la sama periodaĵo
jubilea anonco, pri la Ora Datreveno de **TERRY** kaj **ANICA**
PAGE, kiuj geedziĝis en 1966. La anonco kaj artikoleto
enhavis belan foton de la geedziĝtago.

Kvankam mi scias, ke tiu antaŭaĵo konsistigas preskaŭan
reklam-recenzon, tamen mi sentis devon esprimi la pensojn
tiel.

Nun, al aliaj aferoj. Ni danku al **MATT PEPPERELL**, kiu lernigis
LEKanojn pri la Esperant-lingva tablo-ludo, Tabu', ĉe Diorama.
Tiun ludon Matt efektive mem konstruis, el plasto, papero ktp;
kaj ĝi lerte pensigis kaj ekzercigis la partoprenantojn de tiu
kunveno.

Kaj ĉe Hotelo Ibis, vizitis nin juna usonanino, **BARBARA**, el
Austino, Teksaso. Ŝi amatore kaj registre kantas ĉe Jutubo
(kie ŝi nomiĝas **FRANCES EVERETT**), kaj almenaŭ unu kanto
estas en Esperanto. Ŝian lokan Esperanto-grupon priraportis
la gazeto, Austin American Statesman; cetere ŝi kaj ni bonkore
transdonis - kaj daŭre transdonas - salutojn reciproke al
samideanoj en la propraj landoj.

Atendu pliajn novaĵojn pri LEK en la nova jaro ...

Feliĉan Festsezaron!,

David Thornell

